

Heinrich Heine, En Majo	Heinrich Heine, En la mirida bela Maj'	Heinrich Heine, En admirinde bela maj'	Heinrich Heine, En dolĉega Maj'
<i>tradukita de Man- fredo Ratislavo</i>	<i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>	<i>tradukita de Hans- Georg Kaiser</i>	<i>tradukita de Friedrich Pillath</i>
En Majo, kiam ĉiuj Burgonoj malfer- miĝis, La amo kiel floro En mia kor' estiĝis.	En la mirinda bela Maj', dum sin burĝonoj fen- dis, en mia kor' la amon mi disvolviĝi sentis.	En admirinde bela maj', dum jam burĝonoj kre- vis, jen ankaŭ miakore la amo sin eklevis.	Printempe en dolĉega Maj', Dum la burĝonoj krevis, El mia koro ĝerme Amsento sin eklevis.
En Majo, kiam ĉiuj Birdetoj sin aŭdigis, Al ŝi deziron mian Sopiran mi sciigis.	En la mirinda bela Maj', dum birda tril' ne ĉesis, al ŝi sopiron mian konfide mi konfesis.	En admirinde bela maj', dum birdotril' senbri- dis, jen mi al ŝi sopirojn, dezirojn, ekkonfidis.	Printempe en dolĉega Maj', Dum birda kanto sonis, De l' kora mi sopiro Konfeson al ŝi donis.
<i>Traduko de la Ger- mana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12- 13 - †1856-02-17) en Esperanton de MAN- FREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Ger- manio, *1938-11-04) en 1982-11-14.</i>	<i>Traduko de la Germa- na poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856- 02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 - †1976).</i>	<i>Traduko de la Germa- na poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856- 02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).</i>	<i>Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEIN- RICH HEINE (*1797-12- 13 - †1856-02-17) en Espe- ranton de FRIEDRICH PIL- LATH (†1932-04.03).</i>
MR-002-4 / Arg- 203-403 (2004-04-05 20:37:00)	Arg-203-1082 (2010-05- 26 12:08:05)	Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)	Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)
<i>La poemo troviĝas en la „Libro de la kan- toj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.</i>		<i>La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korekti- ta laŭ la lasta ŝanĝo, ki- un faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.</i>	<i>Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Fried- rich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon <a href="http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath">http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath</a>.</i>